

O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

ANO 42 — N.º 121 - 123 (407 - 409)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

JANEIRO — MARÇO, 1948

Diretor: A. Caetano Coutinho
Redator responsável:
Dr. Carlos Domingues
Telefone — 42-4357

Administração e redação:
Praça da República, 54-sob.
Rio de Janeiro — Brasil

Gratuito para os sócios da Liga
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15
respondukuponoj.

DU DISTINGIĜAJ OKAZAĜOJ

Du distingigaj okazaĵoj, kun internacia karaktero, en la brazila esperantista movado, montras kiel nia lando akceptis la helpan lingvon por siaj rilatoj al aliaj nacioj.

La unua estas la mesaĝo kiun S-ro M. A. Teixeira de Freitas, direktoro de Statistika Servo por Edukado kaj Sanececo, kaj prezidanto de la Interamerika Instituto de Statistiko, sendis al S-ro Stuart Rice, kiu prezidis la unuan kunsidon de la Ĝenerala Kunsido de I. A. S. I., la 9-an de Septembro 1947.

Tiu mesaĝo havas apartan signifon, ĉar ĝia subskribinto, krom esti elektita unua prezidanto de la Internacia Instituto de Statistiko, kiam li rezignis ĉi tiun altrangan funkcion, estis unuanime akklamita honora prezidanto de tiu Instituto.

Jen estas la mesaĝo, kiu favore efikis sur la amerikajn statistikistojn:

Letero sendita de D-ro M. A. Teixeira de Freitas, Prezidanto de la Interamerika Statistika Instituto, al S-ro Stuart Rice, Prezidanto de la Unua Kunsido de la 1-a Ĝenerala Kunveno de la I.A.S.I., je la 9-a de septembro de 1947.

Frate salutante miajn kolegojn de la Interamerika Statistika Instituto, en la momento, kiam ili sidas en tiu Kunveno, al kiu mi pretervole ne povas al esti, sed kies laborojn mi sekvas kun plej grandaj entuziasmo kaj fido, mi al ĉiuj esprimas, per via komplezo, estimata amiko, mian elkoran deziron, ke ĝiaj noblaj taskoj plene sukcesu. Mi ĝojas rimarkante, ke la pristatistikaj kunsidoj en Washington okazas samtempe kun la Konferenco en Rio de Janeiro, en kiu la tutamerika solidareco ricevis pli grandan firmecon per la juraj

ligiloj, kiuj, starigante novajn bazojn por vasta kontinenta kunlaborado, kvaŝaŭ skizas tiun mirindan konfederacion el amerikaj respublikoj, revitan de klarvidaj spiritoj kaj kiu ne nur servos al la tutmondaj paco kaj sekureco, sed, precipe, preparos novan epokon de socia justeco, arde deziratan de ĉiuj altsentaj koroj. Fundamenta ŝtono de tiuj konstruaj klopodoj por iu pli bona mondo, la Statistiko en ĉi tiu momento prezentas ekzemplon, kiu, pro sia alta signifo, restos en la libro de la Historio. Kun rezervo pri la naciaj diferencoj, sed plenumante la kuniĝo-celojn de nia kontinento, la tutamerika statistika sistemo partoprenas en la Washington'aj kunsidoj kiel io unupeca, preta kunhelpi kun la aliaj internaciaj institucioj, precipe kun la bonfaranta Internacia Statistika Instituto, en la granda verko por la kreskado de la rilatoj inter homoj en la tuta mondo. En la momento, kiam finiĝas la komisiono, kiun al mi noble konfidis miaj eminentaj kolegoj, mi ĉiujn elkore dankas pro ilia kunlaborado dum la tempo, kiam mi havis la altan honoron prezidantian karan I.A.S.I. Manifestante la kuraĝigan certecon, ke el la kunsidoj, nun okazantaj en Washington, rezultos granda impulso por la intensigo de la penoj, kiuj sendube havigos al la homaro novan epokon de paca laboro, de reciproka respekto kaj de komuna sekureco, mi volas fine esprimi mian varman personan deziron, ke, inter la alprenotaj decidoj, estu la rekono de Esperanto kiel lingvo helpa de la Statistiko de ĉiuj landoj de ĉi tiu kontinento, laŭ la ekzemplo de Brazilo ĉirilate; se tiel estos, plilarĝigos la altvalora kontribuo de la neŭtrala idiomopro la statistiko, por la interkompreniĝo de la homoj kaj por la idealoj de paco kaj feliĉo de la popoloj.

La alia okazaĵo estas rilate la publikigon faritan de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, de la Statistika Resumo pri Brazilo, kies gravecon ni jam reliefigis en nia lasta numero.

Sur sia unua paĝo, la Resumo entenas la jenan dediĉon:

"Al la Internaciaj Kongresoj de Statistiko okazantaj en Washington en Septembro 1947, la Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística oferas kaj dediĉas tiun ĉi Statistikan Resumon pri Brazilo en la lingvoj Portugala, Angla kaj Esperanta. Ĝi ankaŭ esprimas la deziron, ke la iniciato de Brazilo, subskribita en 1908 de Bulhões Carvalho — la "Fondinto de la Brazila Ĝenerala Statistiko" — kaj nun konfirmata de la Nacia Konsilantaro de Statistiko, koncerne la uzadon de la Neŭtrala Idiomo kiel ilo por internacia komuniĝo, indu la koran solidarecon de ĉiuj Nacioj en la Mondo."

O ESPERANTO NO RADIO

Por iniciativa da Liga Esperantista Brasileira, PRA-2, Rádio Estação do Ministério da Educação e Saúde, estabeleceu um programa de propaganda de Esperanto.

As irradiações são feitas às segundas-feiras, de 13,30 horas a 13,40 horas, sendo as comunicações lidas pela Dra. Ilka Duque Estrada.

Segue-se a transmissão de discos com canto em Esperanto, cuidando a Liga de organizar uma discoteca, com a participação de diversos cantores. O programa é iniciado e encerrado com alguns compassos do hino esperantista "La Espero", executados ao piano pela Sra. D. Edith Bulhões Marcial.

ELLERNADO DE ESPERANTO

“Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”: tiel parolis la glora Zamenhof ĉe la Dua Universala Kongreso de Esperanto. Ni danku al Dio, ke la granda plimulto el niĝaj gesamidanoj emas sian helpan lingvon nur kaj sole pro ĝia “interna ideo”, senduba fundamento de la konstruaĵo, kie ĉiuj homoj povas kunsidi kaj interfratiĝi.

Precipe la parto “ideo” de la idiomo internacia altiras ĉiam pli da novicoj, kaj tiuj baldaŭ fariĝas veteranoj, kun tia pli aŭ malpli granda fervoro, kian ili montris ĉe la pordo de la majesta templo. Tio tamen ne sekvigas, ke ili sin tenu kiel “fantaziuloj”, esperantaj iam paradizon kun anĝeloj, ĉar, kiel diris la majstro, ĉe tiu kongreso, “ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj”. Zamenhof kontraŭstaris la ekskluzivan vidpunkton, laŭ kiu Esperanto enhavas nenion “spiritan”, sed nur “materialaĵojn” por la tiel nomataj “praktikaj” homoj, vidantaj nur ĝian “praktikan utilecon”.

Esence kaj nature akordigema, la “iniciatoro” konsentis, ke “venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean”. Mi estas nulo ĉe la maldekstra flanko de tia giganto, sed mi antaŭsentas, ke, kiam Esperanto estos plene akceptita de la tuta homaro, tio estos realaĵo, ĉar la homoj atingis tian staton, ke la “interna ideo” de io, kion oni nomas lingvo, estas jam nedesirebla de iliaj animoj: tiu “ideo” daŭros plu kun des pli da gravo, aŭ estos ĉe anstataŭita de iu ideo multe pli alta, kiu tiam kondukos la teranojn al ilia vera celo.

Ne nur la beleco de tiu ideo alvokas ĉiam kreskantan nombron da adeptoj, kiuj tial fariĝas “samideanoj”; ilin allogas kaj kaptas la relativa facileco de la lingvo. Konfuzitaj en la implika teksaĵo de la naciaj idiomoj, ni estas efektive ravitaj de la gramatika simpleco de la Zamenhof kreaĵo; post eliro el malluma labirinto, estas ja por ni plezuro trovi, sur kampo libera je ĉiaj baroj, la helecon de ridetanta suno.

Sed simpleco ne kunkrenas nepre facilecon, almenaŭ laŭ la senco absoluta de facileco. Ĉiu povas lerni Esperanton en nelonga tempo; ĝia gramatiko mem estas mirinde kaj mirige simpla, sed lerni gramatikon ne signifas bone posedi la lingvon. Sajnas al mi, ke la diferenco inter Esperanto kaj iu ajn nacia idiomo kuŝas en tio, ke la gramatiko de la unua estas facile kaj tute akirebla, dum la gramatikon je “natura” idiomo neniu (ĉe tiuj, ĝin parolantaj ek de sia infaneco) iam sufiĉe konas. Ĉi tiu opinio ne malvarmigu la karajn gesamidanojn, sed, kontraŭe, ilin instigu al pli arda fervoro por la ellernado de la “dua” lingvo; ĉar, vere, por esti aktivaj Esperantistoj kaj ne iuj simplaj entuziasmuloj pri ĝia ideo, ili ne devus kontentigi per la

nuraj lernado de la dek ses reguloj de la Fundamento.

Multaj laŭsajne intermiksas du malsamajn aferojn, nome: propagandon kaj povoscion. Por iu ideo oni ordinare batalas, bone sciante, pri kia afero ĝi temas; pri iu lingvo oni povas brui, ne konante ĉe la plej malgrandan pecon de ĝia meĥanismo: ĉi tiuj lastaj ne estas “Esperantistoj”, sed “simpatiantoj al Esperanto”. Pli aŭ malpli same kondutas tiuj, kiuj ĵus elrampis el la vindoj de elementa kurso: mi dirus ankoraŭ pli: ili faras pli da malutilo, ol da bono. La Esperantistoj, pli bone sciantaj la lingvon, faras mem ĝian propagandon, pretervole, tute ne konsciante, ke ili uzas instrumenton multe pli efikan, ol la parada trumpeto, kiu diskurigas, anstataŭ kunvoki novajn rondanojn.

Unue, ni lernu; due, ni ellernu. Propagando koncernas al homoj lertaj, kaj se ni ĵuas la aferon mem, kiun ni laŭdas, certe la rezulto ne estas “la celo, al kiu kurage ni iras”. Kiu bolas de tia entuziasmo, ke li sentas sian koron superplena kaj ne povas reteni la ondon da fervoro, tiu unue entuziasmiĝu pri la lingvo kaj ĝin amu en tia grado, ke li ĝin ne difektu, sed gardu kontraŭa ĉia rundo. Tiu legu, kun krajono en la mano kaj papero antaŭ si, la klasikajn aŭtorojn de nia riĉa literaturo; cetero, tiu devas esti la metodo por la ellernado de iu ajn lingvo aŭ scienco. Li legu du fojojn la verkojn de Zamenhof; leginte, du fojojn, kiel supre dirite, la verkojn de la majstro de la lingvo, tiam li povas legi — ankoraŭ kaj ĉiam, la skribaĵojn de Zamenhof. Ĉu vi pensas, ke mi ŝercas? Por de mi estas humerajoj sur tia grava kampo. Dirante, ke mi legu, ankoraŭ kaj ĉiam, la verkojn de la super ĉiuj staranta aŭtoritatulo, mi esprimas veraĵon pli grandan, ol kion oni supras: povus pensi; ĉiufoje, kiam ni malfermas iun verkon de tiu neimitebla artisto, ni lernas ion, kion ni nilojn da fojoj jam pretervidis! Aliaj aŭtoroj estas ankaŭ rekomendindaj: Kabe, al kies lingva korekteco aliĝas vigla, riĉa, nuancita stilo; Bourlet, Grabowski, Privat...

Gesamidanoj: rilate Esperanton ni havas nedeklineblan superan faron — ami ĝin. Kiu amas ion, tiu ĉion faras por ĝia bonstato; ĝa bonstato de nia helpa lingvo estas ĝia plena sciado: ni ellernu ĝin!

PORTO CARREIRO NETO

CONSULTÓRIO

Recebemos dos nossos leitores frequentes consultas sobre o Esperanto e assuntos esperantistas, consultas que muitas vezes são de interesse geral. Assim, resolvemos instituir, no BRASIL ESPERANTISTA, um consultório de tais assuntos, onde daremos solução às perguntas que nos forem endereçadas.

Para a publicação das respostas podem os consulentes, se o quiserem, indicar pseudônimo ou iniciais.

LA LINGVO ESPERANTO EN LA OFICIALAJ RONDOJ

Antaŭnelonge Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko malfermis konkurson por la ofico -Tĥnikaj Asistantoj, specialigitaj je dokumentaĵoj.

La kandidatoj enskribitaj por la ekzameno havis la rajton elekti, kiel fremdan idiomaon, la helpan tutmondan lingvon Esperanto.

Do ties situacio fariĝis paralela al la aliaj idiomaĵoj enmetitaj en la konkurson.

La fakto ke la Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, federacia publika oficejo, kies agado reflektiĝas internacie, postulas de ĝiaj estontaj ofiĉistoj la scipovon de Esperanto, pruvas evidente ke la idiomaon kreitan de Zamenhof jam akceptis la oficialaj medioj, kiel propaganda ilo tra ĉiuj nacioj, pri la eblecoj kaj realoj de Brazilo.

AMKANTO

Kiel la suno por la tago,
Kiel la luno por la nokto,
Kiel rivero por la lago,
Amatino, estas vi.

Kiel radiko por la floro,
Kiel ĉarniro por la pordo,
Kiel la sango por la koro,
Karulino, estas vi.

Kiel la dono por bezono,
Kiel la spiro por la vivo,
Kiel duono por duono,
Ĉiam estos vi kaj mi.

J. PAULDEN.

(El “The British Esperantist”, nov. 1945).

PRÊMIO AOS MEMBROS DE 1948

Em fins de fevereiro já tínhamos expedido mais de 300 exemplares da bela obra **O Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística e o Esperanto**, que, conforme noticiámos no número anterior, será remetida aos membros da Liga Esperantista Brasileira, de qualquer das 4 categorias, que mandarem as suas adesões, diretamente ou por intermédio dos grupos, até 30 de junho de 1948.

Proseguimos na expedição desse interessante livro, do valor de Cr\$ 30,00, que oferece rica matéria de informação, magnífica para a propaganda.

Começamos a receber cartas e cartões de **samideanoj**, que manifestam a ótima impressão que tiveram do prêmio alcançado.

La Unua Konvencio de la Esperantistoj de Minas Gerais

Minas Gerais estas granda kaj grava ŝtato en Brazilo. La teritorio de Minas Gerais estas 585.800 kv.kilometroj, sekve multe pli granda ol pluraj regnoj en la mondo. La moderna ĉefurbo de tiu granda ŝtato estas tre bela urbego konstruita en 1897, nomata Belo Horizonte. Por festi la unuan jarvinkon de la konstruo de la ĉefurbo, la Registaro de Minas Gerais kunvenigis diversajn kongresojn kaj okazigis belajn festojn. La esperantistoj de la ŝtato ankaŭ kunvenis en la ĉefurbo de la 25 ĝis la 29a de Novembro 1947 en vera kongreso, sub protekto de la Registaroj de la ŝtato kaj de la Urbo, sed al tiu Kongreso ili donis la nomon "Unua Konvencio de la Esperantistoj de Minas Gerais", por eviti konfuzon kun la tutlandaj kongresoj de Esperanto, el kiuj la 12a efektiviĝos en Belo Horizonte, espereble en Septembro 1949.

La brava Organiza Komitato de tiu "Konvencio" estis formita de eminentaj nomoj, kiaj estas D-roj Aristóteles Juvenal de Faria Alvim, Luiz Azeredo Coutinho, Wilson Veado, José de Barros Monteiro, F-ino Josefina Schembri, S-roj Oscar Coelho dos Santos kaj Onésimo Faria kaj plej brile kaj energie laboris por atingi grandan sukceson, pri kiu ĝi povas nun fieri.

La ŝtata Prezidanto, D-ro Milton Soares Campos, estis la alta patrono de la Konvencio kaj lia Registaro monhelpis per la grava sumo de dek mil kruceroj. La Prezidanto de Minas Gerais estas ne nur politikisto, sed ankaŭ fama juristo kaj belstila verkisto. Li akceptis la kongresanojn en la registara palaco kaj en bela parolado deklaris sian plenan aliĝon al nia movado. Li interalie diris: "Esperanto estas ne nur nobla idealo, sed ankaŭ rimarkinda kulturmovado, kiun ĉiuj registaroj devas protekti".

La Delegito de U.E.A. kaj B.L.E. en Belo Horizonte, la juna eminentulo D-ro Wilson Veado, havis la plej laŭdindan agadon por tiu sukceso. Unue, li prezentis la ideon en esperantistaj rondoj kaj trovis malvarman akcepton de pluraj esperantistoj; due, kiel Ĝenerala Sekretario de la O.K., li uzis vigle sian prestiĝon en la loka gazetaro, ĉar li estas mem brila ĵurnalisto, kaj per la oficiala radio de la ŝtato, Radio Inconfidência, PRI-3, kie li jam de du jaroj gvidas la programon en Esperanto "Brazila Kroniko", propagandis por la ideo de la Konvencio. Por la laborokunsidoj li verkis du rimarkindajn tezojn. Certe la tuta O.K. brile laboris kaj meritas nian dankon, sed ni devas reliefigi la agadon

de tiu juna samideano, kiu ek de la lernejaraj jaroj nelacigeble kaj inteligente laboras por nia ideo. Lia detala kaj longa raporto pri la agado de tiu Konvencio estas valora historia dokumento.

La urbestro de Belo Horizonte, Prof. João Franzen de Lima, estis la Honora Prezidanto kaj diversaj aliaj aŭtoritatuloj kaj eminentuloj havis titolojn en la Estraro.

En prepara kunsido estas balotita jena Estraro por la Konvencio: Prez. Prof. J. B. de Melo e Souza, 1-a Vicprez. D-ro Mário Ritter Nunes, 2a V.p. Kap. Jorge Firmino Santana, Ĝ. Sek. S-ro José Mauricio da Silva, 1-a Sek. F-ino Lacyr Schettino, 2-a Sek. S-ro Jerry Labate.

La malfermaj kaj fermaj kunsidoj estis solenaj, ĉeestis aŭtoritatuloj; oni ludis la Brazilan Nacian Himnon kaj la himnon "La Espero" en la komenco; en la fino ĥoro de la lernantoj de Profesorino Honorina Prates Campos kantis la himnon "La Espero". Du laborokunsidoj diskutis diversajn proponojn kaj kvar tezojn kaj aprobis dankojn al la Prezidanto de Minas Gerais, al la urbestro de Belo Horizonte, al Brazilo Ligo Esperantista, al Brazilo Instituto

de Geografio kaj Statistiko, al Brazilo Spiritisma Federacio k.a. pro servoj al la Konvencio kaj la Esperanto.

Famaj artistoj kunlaboris en muzikaj programoj dum la solenaj kunsidoj.

Oni inaŭguris tabulon de placo kun la nomo "Esperanto". Bela ekspozicio de esperantaĵoj estis multe vizitita. La programo "Brazila Kroniko" en la oficiala radio de la ŝtato dum tuta horo disaŭdigis per longaj kaj mallongaj ondoj programerojn de la Konvencio kaj paroladis antaŭ la mikrofono samideanoj D-roj Mário Ritter Nunes, Aristóteles Juvenal de Faria Alvim, Benjamin Colucci, Luiz de Azeredo Coutinho kaj Kapitano Jorge Firmino Santana.

Por ekskursoj al rimarkindaj lokoj, la urba registaro disponigis al la konvencianoj la necesajn omnibusojn.

Tiu brila Konvencio antaŭmontras al ni la imponecon de la estonta 12a Brazilo Kongreso de Esperanto, okazonta en Belo Horizonte, en 1949, ĉar la samideanoj en Minas Gerais montris sian kapablon organizi kaj siajn amikajn rilatojn kun la urba kaj ŝtata Registaro.



Unu el la kartoj eldonitaj memoriĝe de la 1a. Konvencio de Esperanto en ŝtato Minas Gerais. La bildo montras la domon kie sidas la oficiala radistacio "Rádio Inconfidência" (PRI-3), apartenanta al la ŝtata Registaro.

Revo Dum Karnavalo

De malproksime, iom mallaŭtigite pro la distanco, iu trumpeto trasonis en la nokto, kaj ĝiaj notoj envenis tra la malfermita fenestro. Paŭlo Garcia, kio rigardadis la ludkartojn, levis la okulojn kaj rompis la longan silenton ŝvebantantan super la ludtablo de "poker".

— Kiel bela estas por mi la sono de trumpeto ludata malproksime, kiam ĉio estas silenta!

Liaj tri kunludantoj ankaŭ ĉesigis la ludadon, kaj Alfredo Lemos ridetis:

— Oni tuj vidas, ke vi estas poeto! Sed, certe ne multe plaĉas al vi, trumpeto ludata, kiel tiu, eble ĉe la pordo de ia dancklubo, anoncanta la baldaŭnan karnavalon...

Paŭlo delasis la kartojn kaj krucigis la drakojn:

— Ankaŭ tiu, karulo... Precipe tiu...

— Ĉu vi ŝatas karnavalon? Jen iu nova por mi!...

— Vi ja scias, ke mi tute ne povas ŝati ĝin. La konfuzo, kiu naskiĝas el la tumultaj gajeco de la popolamaso kolerigas min, kaj dum tiuj frenezaj tagoj mi estas malsanulo... La afero estas tute alia; ĝi estas historio...

Peixoto Leivas ekbruligis cigaredon kaj interrompis:

— Ĉu temas pri tiu historio de iu blondulino, pri kiu mi iam aŭdis?

Paŭlo Garcia kapjesis:

— Guste tiu; ja, ĝi estas historio de iu blondulino...

— Ĉu ni povus ekkoni ĝin? — demandis Lemos. Certe ĝi estas pli interesa ol tiu ĉi ludado, kiu fariĝas teda, malgraŭ ĉio...

Leivas, ĉiam gajhumora, kunigis la ludkartojn kaj, ĵetinte la ludmarkojn en ilian ujon, decidis:

— Alternativo ne estas: ni aŭdu la historion, ĉar mi jam perdis multe da mono...

Tiam, Paŭlo Garcia kliniĝis sur la dorson de sia seĝo kaj, per kvietaj voĉo, ekrakontis:

— Tio okazis en la antaŭkarnavala ĵaŭdo de la ĵus pasinta jaro. Mi sidis kun Afonso Paiva en la tetrinkejo "Lallet", aŭdante muzikon por pasigi la lastan posttagmezon de tiu semajno en Rio, ĉar ni intencis forvojaĝi la sekvontan tagon al farmejo, el kie ni esperis reveni ni nur en la grandfesta merkredo. Subite, iu kelnero alproksimiĝis al mi.

— Tiu ĉi estas por vi, sinjoro — li diris, prezentante al mi ian falditan paperon, sur la servico-pleto.

— Ĉu por mi? mi miris. Kiu sendis?

— Tiu sinjorino, kiu sidis ĉe la unua tablo, kaj nun eniras en aŭtomobilon...

Mi sukcesis vidi en la placo, lumigata de la suno, nur virinon blue vestitan, forportatan de aŭtomobilo. Scivoleme mi prenis la paperon kaj legis ion, kio min surprizis: "Ne forgesu, ke mi atendos vin morgaŭ, ĉe la unua tablo en hotelo "Copacabana". Tiam mi estos vestita per "pieroto" el ruĝa atlaso. Iru ankaŭ maskita, ĉu konsentite?"

Senparole mi donis la paperon al Paiva.

— Kiu ŝi estas? — li demandis post la legado.

— Mi tute ne scias...

Mi alvokis la kelneron, kiu estis malproksimiĝinta:

— Tiu ĉi papero ne estas por mi.

La kelnero ridetis:

— Ĝi ne povus esti por alia persono. La sinjorino diris al mi tre klare: "tiu sinjoro grize vestita, sidanta ĉe la antaŭlasta tablo kun amiko". Do, eraro ne estas ebla. Tie ĉi, nur vi estas grize vestita, kaj nur ĉe tiu ĉi tablo sidas du viroj solaj...

Mi trarigardis la tutan salonon kaj, konstatainte ke la kelnero pravos, forordonis lin.

— Kion vi faros? — demandis Paiva.

— Kion vi faros en mia situacio?

— Mi irus renkonte al ŝi.

— Nu, mi ne iros!

— Kial?

— Ĉar tiu ĉi invitilo ne estas destinita al mi...

Mia kunstanto kliniĝis sur la tablon kaj diris per voĉtono, kiu konvinkas ĉiun ajn:

— Kiu asertas tion al vi? Eble vi havas admirantinon, kiu vi ne konas... Cetere, kio malbona povos okazi, se vi akceptos la inviton? Vi jam scias, ke la invitilo ne trafis sian celon, kaj do, la atendata sinjorino ne aperos... Ne estas gentile lasi sinjorinon sola...

Mi ne memoras, kion plu li diris, sed la fakto estas, ke mi iris...

Sabate, nokte, kiam mi eniris en la "Copacabana"-n, vestita kiel "Arlekeno", kiu oni havigis al mi lastmomente, jam la ruĝa "Pierotulino" sidis ĉe la unua tablo, antaŭ pokalo da ĉampano. Mi alproksimiĝis iom hezite ĉe la ideo, ke mi agas nehoneste, kaj la "Pierotulino" demandis per tre milda voĉo:

— Kio venigis vin tien ĉi?

— Iu letereto...

— Vi estas do la persono, kiu mi atendas...

Kaj ridetante, ŝi etendis al mi la manon kaj devigis min eksidi. Mi sentis min maltrankvila en tia duba situacio, kaj decidis klarigi ĉion:

— Mi devas diri al vi, sinjorino...

Tamen ŝi interrompis min, ĉiam ridetante:

— Diru nenion. Meze de tiu ĉi gajeco ni ne pensu pri seriozaj aferoj. Poste vi diros al mi tion, kion vi devas diri... Ĉu ni dancu?

Mi estis ĝenita en tia situacio kaj en tia loko, kaj laŭŝajne mi ricevis sian inviton kun malmulta entuziasmo, ĉar la virino kun la ruĝa "pieroto" ektimis:

— Ŝajnas, ke vi estas malkontenta. Ĉu vi ne ŝatas tiun ĉi lokon?

— Mi respondis tute sincere:

— Ne.

— Mi ankaŭ ne... Ĉu ni eliru? Ekstere, la nokto certe estas bela...

Ni eliris. Por iri tra la homamaso, kiu plenigis la salonon, ŝi metis sian manon sur mian brakon milde, delikate, kaj mi pli maltrankviliĝis ĉe la konfida gesto de tiu virino, de kiu, ĝis tiam, mi konis nur la mentonon kaj la buŝon: mentonon tre blankan, kaj buŝon tre bone desegnititan, kiu montris belegajn dentojn, kiam ŝi ridetis Mi havis la impreson, ke mi ludas la rolon de alia persono, rolon, kiu ne apartenis al mi. Mirigis min nur la fakto, ke ŝi, aŭdante mian voĉon, ne komprenis la eraron.

Ni transiris la ŝoseon, forkurante de la aŭtomobiloj, kiuj ellasis gemaskitojn, kaj de la homoj, kiuj amasiĝis por vidi la maskvestojn, kaj ni haltis momenton sur la apudmara trotuaro.

— Kien ni iros? — demandis la "Pierotulino".

— Kien vi volos, sed nur post kiam mi estos dirinta al vi tion, kion mi bezonas diri.

La virino kolerete streĉis la buŝon, sed tuj ridetis:

— Bonvolu meti flanken tion — ŝi petis. Vi estas superulo, kiu ne devas malsupreniri al la banalaj de la vivo. Hodiaŭ komenciĝas nova ekzistado, kvazaŭ malfermiĝas alia mondo, mondo sen sociaj interkonsentoj kaj sen konvencioj. Ni adaptiĝu al la momenta situacio, se ne kiel ĉiuj, almenaŭ laŭ nia propra maniero, kiel devas fari du superuloj...

— Kien ni iros?

Kaj ŝi ridetis tiamaniere, tiel alloga, ke mi ne pensis plu. Mi signis al aŭtomobilo, kaj ni ekveturis.

— Jen ajn, kondiĉe ke ni eliru el la urbo! — mi ordonis al la ŝoforo.

La malvarma aĉro de la nokto, frapante mian vizaĝon dum la aŭtomobilo rapidiris, donis al mi agrablan trankvilecon.

— Kial ni ne demetu niajn maskojn? — mi demandis.

La "Pierotulino" frapetis mian manon jam levitan:

— Kia viro! Vj eĉ ne ŝajnas poeto! Ĉu gravas la maskoj? Se ni demetus tiujn ĉi, ni havus aliajn, eĉ malpli travideblajn, super la spirito... Ni restu kiel ĝis nun...

Kaj ni ĝuis tian karnavalan nokton, kian neniu alia jam spertis. Kiam la steloj ekpaliĝis en la ĉielo, ni estis malproksime, en avenuo Niemeyer, sidantaj kvazaŭ amandumantoj sur la muŝego antaŭ la maro. Iu "Pierotulino" kaj iu "Arlekeno" kunigitaj de la ombro de ia mistero. La virino konfide apogis la kapon sur mian ŝultron. Kiam ŝi parolis, ŝia elspiraĵo frapis mian vizaĝon, kaj ŝiaj blondaj haroj estis disŝutitaj sur mia brako. Nur la masko ne forlasis sian lokon...

Tia estis nia karnavalo. Dimanĉe, ni estis en Paŭlejras; lunde, ni vespermanĝis en la kazino "Urka". Ni estis ĉiam iu "Pierotulino" kaj iu "Arlekeno" vere amikaj, alproksimigis unu al la dua, forŝirantaj de la mondo en la karnavalon, unu malmulton scianta pri la alia, ambaŭ kaŝitaj de ia alloga mistero.

Marde, kiam ni denove renkontiĝis, jam malfrue, ŝi memorigis al mi, ke alproksimiĝas la fino de la karnavalo:

— Ĝi baldaŭ finiĝos... Post kelkaj horoj la frenezeco ĉesos kaj ni devas reveni al la vivo...

— Ni daŭrigos, sen maskoj, nian feliĉan karnavalon — mi diris.

Ŝi ne respondis nur ridetis per tia rideto, kiu mi jam trovis ĉarma.

— Kien ni iros hodiaŭ? — ŝi demandis poste.

Kaj vidante, ke mi hezitas:

— Ĉu mi povas proponi?

— Jes.

— Ni finu nian karnavalon tie, kie ni ĝin komencis.

— En la "Copacabana".

— Guste. Mi ja scias, ke tie estas multaj homoj, sed nenio malhelpas, ke ni estu tutso-laj, malproksime de ĉiuj, kiuj nin ĉirkaŭas...

Kaj ni iris.

Sonis noktomezo. La maskoj komencis fali. Mi senpacience atendis la momenton, kiam mi povos ekkoni la vizaĝon de mia kunulino, la momenton, kiam ŝi devos fortiri tion misteron, kiu mi, ĝis tiam, delikate respektis.

Iumomente, mia "Pierotulino" demandis:

— Sabate, kiam ni renkontiĝis, vi deziris diri ion al mi. Ĉu vi ankoraŭ volas tion?

Mi tiam memoris:

— En tiu nokto, mi estis konvinkita, ke via letereto ne estis destinita al mi kaj ke mi okupis la lokon de iu alia...

La rideto denove aperis sur ŝia bone desegnita buŝo.

— Ĝi estis ja por vi. Mi sciis, ke vi deziris diri tion al mi, sed mi prokrastigis vian klarigon ĝis nun, por ke mi ne estu ankaŭ devigita malkaŝi al vi mian sekreton...

— Kaj nun, ĉu vi ĝin malkaŝos?

— Jes, kvankam mi scias, ke vi ne kredos ĝin.

Ĉirkaŭ ni, regis la bruego de la mortanta gajeco, sed ni estis malproksimaj de ĉiuj tiuj

personoj, de ĉio tio. La virino plialproksimiĝis al mi kaj parolis per voĉtono, kiun mi neniam forgesis:

— Mi konas vin de longe, kaj de longe mi vin amas. Sed mi ne povis alproksimiĝi al vi, ĉar se tion farus, mi perdus vin por ĉiam... Mi atendis ĝis la karnavalo, por konservi vin ĉe mi dum kvar tagoj...

Kaj, eble respondante al mia interna mi-rego:

— Mi estas terure malbela. Kiam mi iĝis junulino, la fatalo markis min per vizaĝa misformaĵo pro kiu ĉiuj rigardas min kompare, kaj pro kiu mi devas kovri la vizaĝon per vualo, kiam mi iras en la strato... Nur la buŝo estas perfekta... Se vi konus min, vi ne turnus al mi eĉ simpatian rigardon, kaj mi tro amas vin, ke mi vin ne konservu, kiel mian, almenaŭ unu horon... Tial mi uzis ruzaĵon, sub la mistero de la karnavalo...

Kiam ŝi ekŝilentis, mi havis la impreson, kvazaŭ ŝi ploras. Dum momento, ni restis silentaj. Poste, karese premante mian manon, ŝi denove parolis:

— Ĉu vi pardonas min?

Mi premis en la mia tiun manon varman kaj mildan, kaj, venkante mian emocion, mi diris al ŝi:

— Mi voĉas vidi vian vizaĝon!

— Ne!

— Mi voĉas! Via vantemo troigas la aferon, kaj tute ne okazos tio, kion vi timas...

La virino restis silenta; ĉe tiu atendado, mi sentis mian animon en tumulto. Poste, kun ĝemeto ŝi parolis:

— Mi plenumos vian volon, sed permesu, ke mi preparu min dum momento... Nur unu minuto, dum mi iras al la tualetejo.

Manpremite min, ŝi ekstaris kaj malproksimiĝis. Mi rigardadis ŝin, ĝis ŝi malaperis en la homamaso. Mi ne scias kiom da tempo mi atendis. Mi scias nur, ke iom poste iu frapis mian brakon:

— Ĉu vi atendas iun ruĝan "Pierotulinon"?

— Jes!

— Ŝi sendis al vi tion ĉi.

Mi sentis paperon en mia mano, kaj ĝia portinto malaperis puŝate de la preterpasanto. Ĝi estis malmultvorta letereto, kiun mi ĉiam kunportas: "Mi ne permesas, ke via frenezeco estingu la memoron pri kvar feliĉaj tagoj. Adiaŭ. Eble la proksiman jaron ni denove renkontiĝos."

Jen ĉio, kio al mi restas de mia ruĝa "Pierotulino"...

Paŭlo Garcia ŝilentis momenton, kvazaŭ subigite de la rememoro pri tiu okazaĵo. Poste li finis:

— Mi atendis unu jaron... Kaj kiam venos la karnavalo, la karnavalo, kies alproksimiĝon tiu trumpeto anoncas, mi tie estos en la "Copacabana", atendante "Pierotulinon", provante revivigi iun revon...

Originalo de Raúl Lellis

Esperantigis Manoel Azevedo de Sousa

O ESPERANTO NA ESTATÍSTICA — Sua importância

(Esperanto en Statistiko — ĝia graveco)

Broŝuro presita kiel kontribuo de Statistika Societo de Sankta Katerina al la XI-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Ĝi donas, portugale kaj Esperante, gravajn sciigojn pri la Statistika Societo, la oficialajn decidojn pri la uzado de la helpa lingvo, kaj diversajn bildojn de la instalaĵoj por la funkciado de la Stata Statistika Departamento.

Liga Brasileira de Esperanto

BALANÇO REFERENTE AO ANO DE 1947

	Cr\$
Saldo de 1946	749,00
Cotas	16.695,00
Livraria	23.949,90
Cursos	1.075,00
Congressos	2.381,80
Assinaturas	885,20
Diversas receitas	1.865,80
	41.101,70

	Cr\$
Cotas	8.762,10
Livraria	7.376,50
Revista	9.084,00
Móveis	3.760,00
Gratificações	7.140,00
Instalação	2.269,40
Material de Expediente	1.476,10
Selos e Telegramas	1.440,40
Congressos	3.066,80
Telefone e Luz	211,00
Diversas Despesas	1.916,70
Saldo	598,70
	41.101,70

A subvenção federal do exercício de 1947 foi recebida em 19 de fevereiro de 1948.

Rio de Janeiro, 2 de Janeiro de 1948.

IRANI BAGGI DE ARACJO
Tesoureira

ESPERANTAJ BIBLIOTEKOJ

La Klubo Esperantista de Florianópolis klopodis organizi valoran bibliotekon esperantistan. Laŭ informo, ĝi estas nune unu el la plej gravaj en nia lando, rilate la esperantan verkaron. En la lasta ĝenerala kunveno de la Klubo, S-ro Eugenio Doin Vieira estas aklamita patrono de la biblioteko.

Brazila Klubo Esperanto havas rimarkindan bibliotekon; ĝi enhavas multajn maloftajn kaj elĉerpitajn verkojn. Estas en preparo ĝia katalogo, kiu estos bona propaganda ilo.

Kiel sciante, pluraj esperantistaj grupoj brazilaj ankaŭ organizas siajn bibliotekojn. Espereble, en estontaj numeroj ni povos doni pri ili interesajn sciigojn, se oni bonvolos ilin komuniki al ni.

ASSOCIAÇÃO DE UTILIDADE PÚBLICA

O "Diário Oficial do Estado de Santa Catarina", de 14-11-1947, publicou a Lei n.º 29, de 13 de Novembro de 1947, em cujo texto o Dr. Aderbal Ramos da Silva, Governador do Estado de Santa Catarina, faz saber que a Assembléia Legislativa decretou e éle sancionou a lei que reconhece, como associação de utilidade pública, o *Clube Esperantista de Florianópolis*.

NEKROLOGO



Generalo Silveira Sobrinho

GENERALO J. A. SILVEIRA SOBRINHO

La 7-an de Februaro perdis la brazila esperantistaro unu el la veteranoj de Esperanto en nia lando.

Generalo José Azevedo da Silveira Sobrinho, kiu naskiĝis en ŝtato Paraná, kaj soldatiĝis tre juna, estis emeritita antaŭ multaj jaroj.

Li sekvis la kursojn de la Militista Lernejo, la Staban Kurson, kaj tiun de la Milita Franca Misio, sub la direktado de Generalo Gamelin. Kiel milita inĝeniero, li direktis multajn gravajn konstruaĵojn en ĉi tiu ĉefurbo kaj en diversaj ŝtatoj.

Generalo Silveira Sobrinho estis bona matematikisto, kaj unu el la unuaj diskonigantoj de la Einsteina teorio.

Fervora esperantisto, li estis antaŭ kelkaj jaroj vicprezidanto kaj poste prezidanto de Brazila Klubo Esperanto.

Vergilio Guaianás de Sousa.

Kiam sin pretigis por ĉeesti la 11-an Brazilan Kongreson, neatendite mortis, per malfeliĉega mara akcidento, nia samideano Guaianás.

Vigla propagandisto de Esperanto, ĉiam kaj ĉie li trovis okazon paroli pri nia afero.

Estis li, kiu stimulis kaj animis la ĉefajn membrojn de São Paulo Esperanta Klubo revivigi kaj reorganizi ĝin, en la tempo kiam ĝi ŝajnis tute malaperinta.

Ankaŭ estis li, kiu inspiris la ideon klopodi por ke la ĵurnalo "O Diário", de Santos, enpresu ĉiudimanĉe artikolojn pri la esperantista movado; kaj lia ideo sukcesis.

BRAZILA KRONIKO

AMAZONAS — Manaus — La Grupo Esperantista Amazonas Verda Stelo ne forgesis la datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro de nia lingvo internacia. La 15an de Decembro ĝi okazigis solenan kunvenon, omaĝe al la memoro de nia Majstro. Paroladis pri D-ro Zamenhof kaj pri Esperanto la prezidanto, la vicprezidanto, S-ro Sebastião Augusto, sekretario, S-ro José Nunes de Mello kaj Leŭtenanto Menezes.

CEARA' — **Limoeiro do Norte** — Dum la kunveno okazinta la 15an de Decembro, estis aklamita kaj enoficigita la jena estraro de la Grupo Esperantista de Limoeiro do Norte: — Prezidanto, d-ro Deoclécio Lima Verde; sekretario, s-ino Olivia Lisete de Freitas e Silva; kasisto, s-ro José Guimarães Nunes; bibliotekistino, f-ino Neli Holanda Assis.

En la sama tago komencis funkcii kurso de Esperanto, kun kuraĝiga nombro da gelernantoj.

RIO GRANDE DO NORTE — La ĵurnalo "Jornal da Manhã", de Natal, ŝtata ĉefurbo, entenas artikolojn de nia samideano Arlindo Castor de Lima, pri Esperantaj aferoj.

SÃO PAULO — São Paulo Esperanta Klubo okazigis eksterordinaran kunvenon, por modifi sian statuton kaj por elekti la novan estraron. Jen ties konsisto: Prezidanto, s-ro Newton Ceratti; vicprezidanto, d-ro Hilário Dertonio; ĝenerala sekretario, s-ro René Ventura Salles (reelektita); 1-a sekretario, s-ro Rubens Ariza Martini; 2-a sekretario, f-ino Amélia Levy (reelektita); 1-a kasisto, d-rino Azalia Machado Dias (reelektita); 2-a kasisto, f-ino Astrogilda Guerrini; direktoro de la Departamento por Propagando kaj Kulturo, s-ro José Reganati (reelektita); direktoro de la Departamento por Amuzadoj, f-ino Valdivia Riemma.

La enoficigo de la nova estraro okazis dum kunveno esperanta, en la sidejo de la "Sociedade Teosófica do Brasil.

— Daŭrigas presigi sciigojn kaj artikolojn pri Esperanto diversaj gazetoj, inter ili: "O Estado de São Paulo", "Diário Popular", "Jornal de Notícias", "Folha da Manhã", "Diário de São Paulo", "Diário da Noite", "Jornal de São Paulo", "A Gazeta", "Correio Paulistano", "Folha da Noite", "O Dia", "A Hora".

— S. Paulo Esperanta Klubo la 15an de Decembro solene memoris la datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. Zamenhof, en sia sidejo. La programo, krom paroladon de s-ro Dante Palagi Filho, prezentis muzikan parton.

SANTOS — La ĵurnaloj "O Diário" kaj "A Tribuna" publikigas ĉiusemajne artikolojn pri Esperanto kaj ties movado.

La "Centro de Irradiação Mental Paulino Penin de Campos" kaj la Grupo Esperantista F. V. Lorenz memore celebris la 88an naskiĝan datrevenon de D-ro L. Zamenhof. La samideanoj José Vaz Pereira da Silva kaj Lauro J. Costa paroladis pri la dato 15a de Decembro kaj pri la vivo kaj verkoj de D-ro Zamenhof. La ĉeestantaro omaĝis ankoraŭ nian mortintan samideanon Vergilio Guaianás de Sousa.

La 1an de Januaro, la Loĝio Albor (ektagiĝo), el la Teozofia Asocio okazigis interfratiĝan feston, kun muziko, kantoj kaj paroladoj. S-ro Lauro J. Costa paroladis pri "Esperanto kaj frateca idealo".

BAURU — Ĉe sia sidejo, Grupo Esperantista de Baurú efektiviĝis ĝeneralan kunsidon, por elekti sian novan estraron: Honora Prezidanto, S-ro Homero Escobar; prezidanto, S-ro Anélio Mostério; vicprezidanto, S-ro Nabor da Graça Leite; sekretarioj, S-ro Leônidas Silva kaj Jacob Duarte; kasisto, S-ro José Rodrigues da Cunha Junior; bibliotekistino, S-ino Mercedes Gonzales; Kontrola Konsilantaro, S-ino Helena Moré, Norma Escarabotto kaj S-ro Sebastião de Paiva; direktoroj por la propagando, S-ro Itamir Martins, José Giovanini kaj S-ino Dora Ramires Leão.

— Kun bedaŭro, ni sciigis pri la morto de nia samideano Vicente Romano, unu el la fondintoj de la Grupo Esperantista de Bauru.

SANTA CATARINA — La ĵurnalo "O Estado", de Florianópolis, en sia n-ro de 9 Januaro publikigis longan kaj interesan artikolon pri la kulturaj aktivecoj kaj la agemeco de la Klubo Esperantista de Florianópolis.

Fondita antaŭ 5 jaroj, sekve de la iniciato de prof. Giovanni P. Faraco, estaj ja notinde kiom ĝi povis realigi, ĝis nun, en la Esperanta kampo: elementaj kaj perfektigaj kursoj, biblioteko, esperantaj verkoj, oficiala subvencio, bulteno, festoj, adopto de la helpa lingvo en la eksterlanda korespondado de Statistika Departamento de la ŝtato, kaj oficialigo de la Klubo kiel asocio por publika utileco.

La 28an de Decembro okazis ĝenerala kunveno de la Klubo Esperantista Florianópolis; oni elektis la novan estraron por 1948 kiu estas: Prezidanto, prof. Eugenio Doin Vieira; sekretario, S-ro Wanio José de Mattos; kasisto, S-ro Washington L. V. Pereira; direktoro da la Kultura Departamento, prof. Ari Kardec de Mello.

RIO GRANDE DO SUL — **Vila Torquato Severo (Dom Pedrito)** — Esperanto-Rondeto havas novan estraron, kiu konsistas el la jenaj samideanoj: — Prezidanto, S-ro João Severo; vicprezidanto, S-ro Carlos S. Pereira; sekretarioj, S-ro Paulo Guilherme Netto kaj Emilio Leal; kasisto, S-ro Policarpo Severo; bibliotekistino, S-ino Alba Alves.

MINAS GERAIS — **Uberlandia** — Jen estas la nova estraro elektita por direkti dum 1948 la Uberlandian Esperantan Klubon: — Prezidanto, S-ro Milvar de Menezes; vicprezidanto, S-ro Orozimbo Arantes; la sekretario, S-ro Haroldo Leite Pinto; 2-a sekretario, S-rino Cléia Vilela da Silva; kasistoj, S-ro Helio Martins Costa; kaj, S-ro Carlos Torido Leite; bibliotekistino, S-ino Aurora Antunes da Motta; direktoroj: sociala kaj por ekskursoj, S-ro Afonso Tanniceli; por la instrufako, S-ino Ceila Costa Pereira; por sportoj, S-ro Omar Sebastião Cerqueira; por propagando, S-ro Adair Peres Carvalho.

RIO DE JANEIRO — La 19an de Decembro estis elektita, kaj la 1an de Januaro estis enoficigita la nova estraro de Associação Esperantista do Rio de Janeiro. Konsistigas ĝin la jenaj samideanoj: — Prezidanto, S-ro Delio Pereira de Souza; sekretarioj, d-ro Braz Consenza, S-ro Octaviano da Silva Lopes kaj S-ino Cedilha Netto; kasistoj, S-ro Manoel Barbosa de Mello kaj f-ino Elza Travassos Faria; bibliotekisto, S-ro José Consenza.

— "Jornal do Comércio", el ĉi tiu ĉefurbo, unu el la plej gravaj brazilaj gazetoj, publikigis en sia eldono de 15a de Februaro la tutan konferencon, portugallingve tradukitan — "De la estinto al la estinto — Memoroj pri iu juneco en Parizo", kiun faris en la sidejo de Associação Brasileira de Imprensa, profesoro Alfred Agache, okaze de la 88a datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof.

— "O Farmacêutico Brasileiro" (La Brazila Farmaciisto), en sia n-o 68 (1947) presigis artikolon pri "Esperanto kaj la Kemiistoj".

O Esperanto no estrangeiro

ALEMANHA — O grupo "Labor", de Munique, em junho de 1946 contava já 500 membros. Havia 15 cursos na Universidade e em escolas populares. Muitos jornais bavaros inserem comunicações e artigos sobre o Esperanto. Em Rüsselsheim existe novamente a rua Zamenhof. A Escola Profissional "Suggestiv", de Frankfurt a. M., tem curso de Esperanto.

G. E. A. — Mais de 100 esperantistas nas Zonas britânica, norte-americana e francesa, da Alemanha, reuniram-se, em Frankfurt-Mains, e resolveram restaurar a "Germana Esperanto-Asocio, tendo sede oficial em Munique. Foram eleitos presidente o Dr. Siegfried Ziegler e 1.º Secretário Felix Epstein.

ARGENTINA — "Crítica", um dos mais importantes diários de Buenos Aires, publicou em sua edição de 2 de abril, uma entrevista de um de seus redatores com o representante de Brazilia Ligo Esperantista e de outras organizações esperantistas brasileiras, Ismael Gomes Braga, componente da delegação brasileira ao 4.º Congresso Argentino de Esperanto.

"Crítica", reconhecendo o papel que deve desempenhar o Esperanto no mundo, propõe-se a prestar amplo apoio aos núcleos esperantistas de seu país, e para começar resolveu fazer pelas colunas do jornal, um curso de Esperanto.

AUSTRIA — Os esperantistas austríacos têm trabalhado enérgica e eficazmente, a contar da terminação da guerra.

Entre outras cousas, já o fizeram:

Nova fundação de Austria Esperantista Federacio; e organização de 56 grupos, dos quais 21 em Viena.

Reativação de antigos grupos especiais: Laborista, Katolika, Poëtista, Fervojista.

Criação do "Esperanta-Centro" (Viena, I, Neutorgasse 9).

Orgão oficial de A. E. S.: "Austria Esperanto Revuo".

Reativação de "Austria Esperanto Instituto".

Fundação de "Austria Esperanto Servo", para a aplicação prática do Esperanto.

Fundação de "Austria Societo de Amikoj al Esperanto" que tem como orgão oficial a gazeta "Welt im Vort".

Fundação de "Esperanto Eldonejo Tramondo", da revista "Die Weltspraureu Nederland, Arhem, afamado insti-

Reabertura de Internacia Esperanto Muzeo em Wien-Hofburg.

Abertura de "Viena Esperanto Seminario", para cursos superiores de Esperanto.

Introdução do ensino não obrigatório do Esperanto em diversas Escolas Superiores de Técnica, Comércio e Agricultura.

Vários cursos pelo rádio.

CANADA — Funcionam com entusiasmo cursos de Esperanto nos grupos esperantistas de Toronto e de Vancouver. Nesta cidade reside agora o Dr. F. J. Belinfante, conhecido esperantista holandês, agora professor da Universidade de British Columbia, que nela fará um curso.

O Sr. R. Redhead, de Victoria, B.C., com 75 anos de idade, continúa a dedicar-se à propaganda do Esperanto.

CANÁRIAS (Ilhas) — Na Universidade de La Laguna realizou-se, de janeiro a maio, um curso facultativo de Esperanto, sob a direção do prof. J. Régulo Pérez, docente de línguas clássicas da Faculdade de Filologia. Inscreveram-se no curso quatro professores da Universidade.

CHECOSLOVÁQUIA — Para 1948 SOKOL, a famosa federação de ginástica checoslovaca, está preparando sua 40a. Olimpíada, em Praga. Esta organização foi fundada em 1862 para educação do povo, no sentido do antigo ideal do bem e do belo, e da antiga máxima — *Mens sana in corpore sano* (sana spirito en sana korpo). Em 1938, Sokol tinha 800.000 membros, organizados em 3265 sociedades.

Por proposta de Esperanto-Asocio em Česloslovakio, Sokol já publicou um prospecto de propaganda em Esperanto e prepara também uma publicação ilustrada, interessante para os esperantistas.

Escrevam todos para Sletova Kancelar — Komitato de la Sokola Kongreso — Tyršuv Dum, Praha III. Checoslováquia.

DINAMARCA — Centra Dana Ligo organizou também, este ano, seus Cursos de Verão. Serão realizados em Els'nor e em Hadsten (Jutlândia).

O Sr. Morariu, conhecido samideano rumeno, continúa sua excursão através da Jutlândia, fazendo palestras e conferências de propaganda em várias

ESTADOS UNIDOS DA AMÉRICA DO NORTE — Segundo notícia

"Amerika Esperantisto", a Sra. Julia Isbrucker, uma das mais competentes e ativas esperantistas de todo o mundo, dirigente de Internacia Esperanto-Instituto e de Universala Ligo, na Holanda, prepara-se para visitar a América do Norte.

Na Universidade de Iowa o Esperanto faz parte de provas de exames. O Dr. G. D. Stodkard compilou testes para verificar a capacidade dos estudantes de línguas modernas.

Em Troy, Pa, trabalha pelo Esperanto a Sra. Fannie R. Baker, que conta apenas 85 anos de idade. O Sr. Frank Schmidt, que estudou o Esperanto na Boêmia, em 1895, e tem hoje 82 anos, dedica-se ao Esperanto, em Abbottsfort, Visc.

Aos 84 anos de idade, faleceu um dos pioneiros do movimento esperantista norte-americano — Fraül'no Effie J. Meriam, fundadora de Bostona Esperanto-Societo, em 1905, a mais antiga sociedade esperantista nos Estados Unidos. Foi secretária geral de E. A. N. A. Sua residência, na rua Boylston 486, no coração de Boston, era o centro regional de todas as informações sobre o Esperanto. Tinha como divisa as palavras do profeta: "*Kiel viaj tagoj, tiel ankaŭ estos via forto*".

FRANÇA — Celebrou o 45.º ano de sua fundação o grupo esperantista de Le Havre.

A Liga Francesa dos Esperantistas Católicos continúa a fazer propaganda do Esperanto e faz um apêlo a todo esperantista católico para que utilize todas as suas relações nos movimentos e sociedades católicas, em prol da divulgação da língua.

A gazeta *Les Nouvelles Economiques* publicou interessante trabalho sobre a atual produção e consumo da eletricidade na Europa. Este trabalho é uma prova da utilidade prática do Esperanto, pois foi conseguido pela compilação de informações obtidas em todos os pontos da Europa, de *delegitoj* de I. E. L., por seu autor, esperantista, André Remond, de Paris.

HOLANDA — Polytechn'sch Bututo de ensino técnico, estabeleceu também curso de Esperanto para seus alunos.

Phoenix é uma conceituada revista artística, mensal, ilustrada, tratando de pintura, escultura, ornatos. O Dr. J. A. Leerink, redator dessa importante publicação, pretende, como esperantista, acrescentar a todos os trabalhos, resumo em Esperanto. Deseja que os esperantistas escrevam ao editor, para convencê-lo das vantagens em ser usado chee de "Murgazeto" para propaganda.

o Esperanto em *Phoenix*. Endereço: "De Spiegel" — Amsterdam, Prisen-gracht 856.

O 28.º Congresso de "Asocio de Laboristoj Esperantistoj F. L. E." realizou-se em Heerlem, com grande brilho e numerosa assistênc'a. Dentre as resoluções aprovadas salienta-se a que recomenda ao Governo tomar em consideração o ensino do Esperanto nas Escolas para professores: possibilitar êste ensino nas últimas classes das escolas elementares e estudar a possibilidade de uma convenção internacional para a adoção e uso do Esperanto.

HUNGRIA — No Parlamento de Budapeste, o deputado Stefano Csurgai, vice-presidente de H.E.S. e fak-delegito de I.E.L., interpeleou o Ministro da Instrução sôbre a introdução do ensino do Esperanto em algumas escolas. A resposta foi negativa. Todavia, uma ordem ministerial permitiu o ensino em uma Escola para formar professores e outro curso em um ginásio, pago pelo Governo. Existem ainda outros cursos para os funcionários do Parlamento, pelo prof. L. Kokeny.

Apoiado pelas Estradas de Ferro Oficiais Húngaras o samideano L. Korsós tem feito propaganda do Esperanto entre os ferroviários, das quais 4.000 já se interessam por esta língua.

INGLATERRA — *Fleming Fulcher* — Faleceu êste nosso samideano, que durante 37 anos trabalhou pelo Esperanto. Com Bernard Long, foi autor do excelente English-Esperanto-Dictionary, que tão bons serviços presta a todos os esperantistas.

Fundou-se em Londres *Brita Esperanta Sciencia Asocio*, que visa propagar o Esperanto nos campos científicos e tecnológicos da Inglaterra, auxiliar a colaboração entre cientistas esperantistas britânicos e estrangeiros, e ainda restabelecer a Internacia Sciencia Asocio Esperantista.

Sua d'retoria e seu conselho consultivo compõem-se de homens notáveis em sua respectiva esfera, e simpáticos ao movimento esperantista. Entre eles: Prof. Flugel, Dr. Duncan, Eng. Bennis, Com. Clissold, Dr. Fawcett, Eng. Gueritte, Hannay Thompson, Ernest Relf, Prof. W. Collinson, E. D. Durant.

Por motivo da aquisição feita pelo Governo Inglês, dos direitos do *Basic English* ao Prof. Ogden, Brita Esperanta-Asocio enviou uma circular a cada um dos membros do Parlamento.

A circular esclarece, em resumo, os fins do Esperanto, sua função e resultados alcançados e ressaltou o valor educativo desta língua.



Ilustrita broŝuro publikigita de Brazilo Instituto de Geografio kaj Statistiko, memoriga de la 11a. Brazilo Kongreso de Esperanto en São Paulo. Brazilo Ligo Esperantista sendas unu ekzempleron al la alilandaj esperantistoj kiuj ĝin petas, aldonante al la letero dek respondkuponojn.

JAPÃO — O Sr. Mark Starr, Diretor da *Internacia Unio de Laboristoj de Virinaj Vestoj* visitou o Japão, a convite do Comando Superior dos Exércitos Aliados. Escreveu o Sr. Starr: "O Esperanto tem muita utilidade e aplica-se bem no Japão. Visitei o Esperanto-Instituto. Em Tóquio, Quioto, Osaka, Tukuoko, Izenka, encontrei esperantistas, tendo a satisfação de entrar em contacto com o povo, por meio do Esperanto, que venceu a barreira das línguas. Com meu relatório ao General Mac Arthur, propus que os consultores deveriam conhecer o japonês e o Esperanto, para auxiliá-los a eficiência".

Realizou-se em Junho o 33.º Congresso Japonês de Esperanto, em Tóquio, na Universidade Imperial.

IUGOSLÁVIA — O 13.º Congresso dos Esperantistas Iugoslavos (o primeiro depois da guerra) realizou-se em Varazdien.

POLÓNIA — O Grupo Gdansk, da Associação Esperantista Polonesa, para fins de propaganda solicita aos samideanos de todo o mundo cartas, cartões

postais ilustrados, etc., garantindo resposta. Endereço: Asocio de Esperantistoj, Gdansk-Wrzeszoz, ul. Potokova 29 — Polónia.

O Esperanto é matéria obrigatória no Ginásio Comercial de Gdynia e sua direção solicita material para seu museu, destruído durante a guerra.

PORTUGAL — "O Ateneu" — Recebemos essa revista, do Ateneu Popular de Montijo, trazendo excelente artigo de Saldanha Carreira — A paz pelo Esperanto".

"Unuigo", órgão oficial de Portugal Esperanto-Ligo, traz interessantes artigos científicos (*Nia tero*) e de ensino do Esperanto (*Perfektigaŭ lecionoj*).

SUÉCIA — *H. Seppik*. Na revista "Esperantista", de Checoslováquia, lemos a triste notícia da morte de Henrik Seppik, que lecionava Esperanto na Universidade de Tartu. Êste conhecido samideano foi o autor do excelente livro "La tuta Esperanto", gramática para aperfeiçoamento da língua e guia para professores de cursos de Esperanto, editado em 1938 por "Literatura Mondo", de Budapest.